Aprende el Idioma Internacional

Esperanto

Fácil de aprender
Fácil de hablar
Fácil de entender
Neutral

Cursos

Lugar: **Edificio de Posgrado de la Facultad de Derecho-UNAM, Aula 2**

Curso Entresemana: **del 4 de septiembre al 4 de octubre de 2007, Martes y Jueves, de 1:30 a 3 p.m.**

Curso de Sábados, **del 1ro de Septiembre al 1ro de Diciembre, del 2007, de 10 a 1 p.m.**

Imparten: **Luis Córdova Hugo González y Daniel Moreno**

Informes: **luisesperanto@yahoo.com; hugonz@gmail.com; dancxjo_@yahoo.com ó al 5554 0348**

ENHAVO

	PAGHO
PRI LA KURSOJ DE ESPERANTO EN MEKSIKA UNIVERSITATO (2003-2007)	3
INFORMO PRI "NAU KURSOJ DE ESPERANTO EN LA JURA FAKULTATO DE UNAMo EKDE 2003"	7
44 GESTUDANTOJ EN UNAM-A KURSARO_2007_2 ! !	8
SALUTON AL NOVAJ GELERNANTOJ DE ESPERANTO EN UNAM_2007_2	8
PRI INFORMEMA PAROLADO PRI KURSOJ DE ESPERANTO EN UNAM-2007	9

PRI LA KURSOJ DE ESPERANTO EN MEKSIKA UNIVERSITATO (2003-2007)

Luis Lorenzo CÓRDOVA ARELLANO
Profesoro de Esperanto kaj Internacia Juro-UNAMo
Retadreso: luisesperanto@yahoo.com
Junio-2007

La 27-an de augusto 2003, mi petis klasejon por instrui Esperanton en la Jura Fakultato (www.derecho.unam.mx) de la Universitato Nacia Autonoma de Meksiko (UNAMo; www.unam.mx), la plej grava de la lando kaj inter la plej gravaj el Latinameriko.

La Direktoro de la menciita Fakultato, la D-ro Fernando Serrano Migallón, decidis vidi min por paroli pri la afero.

Mi rapide respondis al la peto. Kiam ni vidis unu la alian, li diris al mi ke la pordoj de la Jura Fakultato estas malfermitaj por Esperanto kaj ke li havas geamikojn kiuj rakontis al li pri la Internacia Lingvo, sed li ne havis okazon lerni ghin.

Do, la 27-an de septembro 2003, ni komencis la unuan kurson de Esperanto en la Jura Fakultato-UNAMo, kaj finis la 29-an de novembro 2003.

Dank' al salutmesagho de Cvi Solt, poste mi eksciis ke tiu kurso ne estis la unua en UNAMo. Li diris al mi retadrese kaj hispane: "Mi lernis Esperanton en UNAMo je la jaro 1958 kun Profesoro Juan de Oyarzabal" (privata mesagho sendita al mi; 4-an de septembro 2005).

La unua kurso de Esperanto komencighis kun 45 gelernantoj el diversaj fakoj (ekonomiko, filozofio, internaciaj rilatoj, juro, kemio, komunikado, literaturo, kaj inkluzive de mez-lernejoj).

Estas interese diri ke ekde la unua kurso ghis hodiau, chiam partoprenis en ghi gelernantoj de kemio kaj juro.

En tiu unua kurso, 29 gelernantoj finis la kurson.

Foto pri la unua kurso estis publikita che universitata Gazeto la 4-an de decembro 2003 (http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/historico.html)

La dua kurso de Esperanto komencighis la 6-an de marto kaj finis la 12-an de junio 2004. Estis du kursoj: 1) por komencantoj, kaj, 2) por komencintoj.

La duaj kursoj komencis kun 44 gelernantoj kaj finis kun 11 komencaj gerlernantoj, kaj kun 9 progresantoj.

Foto pri la dua kurso estis publikita che universitata Gazeto la 17-an de junio 2004. [Vidu: http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2004/040617.pdf]

La triaj kursoj de Esperanto komencis la 4-an de septembro kaj finis la 4-an de decembro 2004.

Partoprenis en la kurso 22 gelernantoj, sed estis la unusola fojo kiam ni ne finis la kurson pro diversaj kialoj (tre frua horo, ktp.).

Pro tio ni shanghis la horojn por la kursoj (poste la kursoj estis inter la 10-a ghis la 13-a horo tage, sabate).

La kvara kurso komencis la 12-an de februaro, kaj finis la 11-an de junio 2005.

Estis kurso nur por komencantoj.

Ni komencis kun 33 gelernantoj. Finis la kurson 15 komencintoj.

Foto pri la kurso estis publikita en universitata Gazeto la 20-an de junio 2005. [Vidu: http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2005/050620/gaceta.pdf]

La kvina kurso de Esperanto komencis la 27-an de augusto kaj finis la 3-an de decembro 2005.

Komencis la kurson 29 gelernantoj. Finis la kurson 14 komencintoj.

Foto pri la kurso estis ankau publikita che universitata Gazeto la 5-an de januaro 2006. [Vidu: http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2006/060105/gaceta.pdf

La sesa kurso de Esperanto komencis la 18-an de februaro kaj finis la 10-an de junio 2006.

Komencis la kurson 17 gelernantoj. Finis la kurson 13 komencintoj.

En chi tiu kurso nia metodo estis legi artikolojn prenitaj el la reto, kaj traduki ilin al la hispana lingvo. “Tiel –diris la gelernantoj- estas pli interesa la kurso.”

Foto estis publikita en universitata Gazeto la 22an de junio 2006. [Vidu: http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2006/060622/gaceta.pdf]

Dum la sesa kurso ni komencis klubon de Esperanto aranghita de Hugo González Monteverde (hugonz@gmail.com), juna venezuela esperantisto loghanta en Meksikurbo, kaj de Daniel Moreno (dancxjo_m@yahoo.com), juna meksika esperantisto.

La sepa kurso de Esperanto komencis la 19an de augusto kaj finis la 2-an de decembro 2006. Dum chi tiu kurso, ni komencis kun 21 gelernantoj kaj finis kun 11 gelernantoj. Foto pri la kurso ne estis publikita.

La oka kurso de Esperanto en UNAMo, komencis la 17-an de februaro kaj finis la 16-an de junio 2007. Ni komencis kun 14 gestudentoj sed finis nur kun 5 gestudentoj. Foto estis publikita la 25-an de junio 2007 en UNAM-a gazeto: http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2007/070625/gaceta.htm [Vidu la duan paghon]

Dum la naua kurso, Daniel Moreno (dancxjo_m@yahoo.com) kaj Hugo Gonzalez (hugonz@gmail.com) estas la profesoroj de la kursoj. Daniel instruas dum sabatoj (ghis

decembro-2007) kaj Hugo dumsemajne, ghis novembro. Entute en la du kursoj estas 44 gestudantoj. Ni esperas ke ili chiuj finos la kursojn (sabate kaj dumsemajne).

Foto pri ambau kursos vi povas vidi che: http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2007/071206/gaceta.htm (dua pagho)

Pro amo al la vero, mi devas diri ke mia edzino Mylai Burgos (my_laihabana@yahoo.ca), chiam helpis al mi aranghante chion por la kursoj.

La klubo de Esperanto che UNAMo komencis kun 6 progresantoj de Esperanto, kaj finis kun la samaj partoprenantoj.

Ni baldau petos klasejon por la venontaj kurso de Esperanto.

Espereble ni komencos kun multaj gelernantoj!

Interalie, mi devas komenti ke la 21-an de majo 2006 aperis che nacia meksika jhurnalo “Reforma” (www.reforma.com), artikolo pri la kursoj de Esperanto en UNAMo. Mi estis intervjuita.

Malgrau ke la artikolo havas eraron, char diras ke nur ekzistas 2 mil esperantistoj tra la tuta mondo, jam kelkaj interesuloj telefonis al mi demandante pri la venontaj kursoj pri la Internacia Lingvo Esperanto, la plej facila lingvo por lerni, kaj la pasporto al la tuta mondo.

Ankau, mi komentu ke dum 2001 mi instruis Esperanton al diversaj juraj gestudentoj el diversaj meksikaj shtatoj (Chiapas, Coahuila, Tamaulipas, ktp), kiuj, kiel mi, cheestis en Meksikurbo por fari esploron pri juro en la Instituto pri Juraj Esploroj (info.juridicas.unam.mx) kaj poste en La Kolegio de Meksikio (www.colmex.mx). Tiam mi petis al geesperantistoj tra la tuta mondo sendi salutmesaghon por la kurso, kaj por pruvi ke Esperanto ne estas “morta lingvo”, kiel iu jura esploristo mise diris. Ni ricevis multajn salutmesaghojn el multaj landoj! Dankojn al chiuj !

Poste mi kutime petis salutmesaghojn por la kursoj en UNAMo, kaj ni chiam shatis ricevi ilin.

Kiam mi petis sendi dankojn al D-ro Fernando Serrano -la nuntempa Direktoro de la Jura Fakultato-UNAMo – pro lia helpemo por la kursoj en tiu Fakultato, ni ricevis pli ol 100 retmesaghojn de geesperantistoj el diversaj landoj tra la tuta mondo!

Pro tio kion mi diris, mi povas diri ke jam komencis bonan kernon de Esperanto en Meksikurbo, speciale en UNAMo, kaj tio, mi esperas, richigos la movadon de Esperanto en nia lando kaj eble en Latinameriko.

Mia revo estas havi Universalan Kongreson de Esperanto chi tie en Meksikurbo, speciale en UNAMo. Kiam?

Renato Corsetti, la iama Prezidento de Universala Esperanto Asocio, diris al mi: “Tuj kiam ekzistos landa movado, kiu invitos ghin” (privata mesagho al mi; la 5-an de junio 2006).

Je la venonta kurso de Espeanto ni ankau daurigos la klubon, kaj ni jam komencis korespondi kun aliaj esperantistaj kluboj. Eble ni havos la kurson dum mardo kaj jhaudo.

Mi devas diri ke mi lernis de D-ro Rubén Feldman González, fondinto de Pasporta Servo, ne nur la internacian lingvon, sed ankau la spiriton de ghi.

Mi finos nur dirante: Por Esperanto, kiel dua lingvo de chiu homo.

INFORMO NAU KURSOJ DE ESPERANTO EN LA JURA FAKULTATO DE UNAMo EKDE 2003

Prof-o Luis Córdova (luisesperanto@yahoo.com)

#	DATO DEL KURSO	KVANTO DE GELERNANTOJ ALIGHITAJ	KVNATO DE GELERLANTOJ FINIGHINTAJ	DATO DE LA FOTO PUBLICITA EN GAZETO-UNAM-o
1	27/sep/2003 ghis 29/nov/2003	45	29	4/dec/2003
2	06/mar/2004 ghis 12/jun/2004 **Komento:** Du kursoj, por komencantoj kaj progresantoj	44	20 (11 komencantoj kaj 9 progresantoj)	17/jun/2004 http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2004/040617.pdf
3	04/sep/2004 ghis 04/dec/2004	22	**Komento:** Oni ne finis la kurson. Ni shanghis la horojn de la kurso.	-
4	12/feb/2005 ghis 11/jun/2005	33	15	20/jun/2005 http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2005/050620/gaceta.pdf
5	27/aug/2005 ghis 03/dec/2005	29	14	05/jan/2006 http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2006/060105/gaceta.pdf
6	18/feb/2006 ghis 10/jun/2006 **Komento:** Komencis Klubon de E-o (Hugo González Monteverde, hugonz@gmail.com)	17	13	22/jun/2006 http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2006/060622/gaceta.pdf
7	19/aug/2006 ghis 02/dec/2006	21	11	-
8	17/feb/2007 al 16/jun/2007	14	5	25/jun/07 http://www.dgcs.unam.mx/gacetaweb/2007/070625/gaceta.htm
9	04/09/2007 al 01/12/2007	44	-	-
	TUTE (OCTOBTO-2007)	**269**	**107**	**6**

ESPERANTAJHOJ

44 GESTUDANTOJ EN UNAM-A KURSARO_2007_2 ! !

Karaj,

Entute, en niaj du kursoj de Esperanto en UNAM_2007_2, ni jam havas 44 gestudantojn.

Mi dankas kaj gratulas denove al Daniel Moreno kaj Hugo Gonzalez pro instrui chi tiujn kursojn.

La esperanta movado en Meksiko kreskas.

Ni volas viziti Pollandon dum 2009 en la UK.

Elkore,

Luis Lorenzo Kordova Arejano
UNAM-Meksiko
luisesperanto@yahoo.com

SALUTON AL NOVAJ GELERNANTOJ DE ESPERANTO EN UNAM_2007_2

Estimataj Novaj Gestudantoj de la Internacia Lingvo Esperanto ,

Mi salutas vin chiuj nur regratulante vin chiuj 20 novaj gestudantoj de la Kurso de la Internacia Lingvo Esperanto en la Universitato Nacia Autonoma de Meksiko (UNAM) dum la dua duono de la nuntempa jaro 2007.

Vi chiuj pluestas inter la 225 gestudantoj kiuj alighis al niaj kursoj ekde 2003 en UNAM, kaj mi esperas ke vi pluestos inter la 107 gestudantoj kiuj finis la kursojn kiujn ili prenis.

Ni instruas Esperanton en la Jura Fakultato-UNAM ekde 2003 dank' al la malfermeco de ghia Direktoro, la D-ro Fernando Serrano Migallon kaj siaj kunlaborantoj.

Mi esperas ke ni daurigu la kursojn de Esperanto en tiu Fakultato, ankau kun la venonta estraro de ghi. La estraro shanghos la venontan mardon-2008.

Interalie, mi memorigas vin chiuj ke vi povas ankau kontakti al mi pere de retadreso por demandi au komenti ion pri la kursoj ktp.

Mi dankas denove al Daniel Moreno kaj Hugo Gonzalez pro ilia helpo instruante chi tiujn novajn kursojn de Esperanto (sabate kaj dumsemajne). Mi devas diri ke estas la unua fojo kiam ni ofertas kurson intersemajne.

Chi tiuj novaj kursoj instruitaj de Daniel kaj Hugo montras ke la meksika esperanta movado iom post iom kreskas.

Mi devas diri ankau ke mi instruis Esperanton ekde 2003 nur pro sento de respondeco, kaj la fakto ke Daniel kaj Hugo alighas al chi tiu projekto nur kreskigas mian felichon.

Mi ne diros plu kaj ricevu de mi elkorajn salutojn, kaj mi esperas ke vi estos novaj esperantistoj kaj ke vi kreskigu Esperantujon, monda komunikujo por chiuj.

Elkore
Por Esperanto kiel dua lingvo de chiu homo sur la tero

Luis Lorenzo Kordova Arejano
Profesoro de Internacia Juro kaj Esperanto-UNAM
Meksikurbo la 2-an de septembro 2007.
luisesperanto@yahoo.com

PRI INFORMEMA PAROLADO PRI KURSOJ DE ESPERANTO EN UNAM-2007

Hodiau vespere, en la Jura Fakultato , en la auditorio Eduardo Garcia Maynez, ekde la 4-a gris la 5-a vespere, Daniel Moreno, Hugo Gonzalez, Luis Cordova kaj Martin Shaeffer, parolis pri Esperanto kaj pri venontaj kursoj de Esperanto en Universitato Nacia Autonoma de Meksiko (UNAM, www.unam.mx).

Partoprenis en ghi preskau 100 personoj el la Universitato. Fotojn vi povos vidi poste en la retpagho de Hugo (hugonz@gmail.com)

Por la venontaj kursoj, la profesoroj estos Daniel (sabatoj) kaj Hugo (trasemajne), altnivelaj esperantistoj kiuj pretas instrui la Internacian Lingvon. Mi ne instruos dum chi tiu semestro, char mi kredas ke ni bezonas novajn instruistojn de Esperanto.

Mi devas diri ke mi instruis Esperanton senchese ekde 2003 en la Jura Fakultato de UNAM, dank' al la malfermeco de la Direktoro de tiu Fakultato (D-ro Fernando Serrano Migallon). Vi povas peti al mi informon pri la historio de tiuj kursoj al luisesperanto@yahoo.com

Estas interese diri ke informo pri la venontaj kursoj aperas en la retpagho de la Jura Fakultato-UNAM che: http://v880.derecho.unam.mx/web2/pop/evento.html [augusto-2007]

La gelernontoj de la novaj kursoj de Esperanto, espereble ili ricevos inviton por la meksika kongreso en Aguascalientes-2008 (Vicente Valdes, wbejaranomx@hotmail.com). Ankau por la lernintoj de Esperanto en la unamaj kursoj.

Elkore

Luis Kordova Arejano
Profesoro de Internacia Juro kaj Esperanto-UNAM
La 29-an de augusto 2007.